

206

STIFTO

El la enhavo:

E-tilio de Ĉeĥio en Malbork
SET Lančov
OSIEK-konferenco
Multlingva Eŭropo
Libroservo
Libeloj
Ankoraŭ Nova PIV
ZEOj en Ĉeĥio

1
2003

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**Ing. Vojtěch Zelenka solene inaŭguras
E-memorŝtonon de Ĉeĥio apud tilio
en Parko de la Mondo en Malbork.**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),
rete Starto:

malovec.starto@clavis.cz.

www.clavis.cz/starto. **rete ĈEA:**

cea.polnický@quick.cz (sekretario)

podhradska@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 250 Kč. B 150 Kč, D 70 Kč. E 70 Kč. F 5000 Kč. G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

Sekcioj de ĈEA: junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, pri informadiko

Komisionoj de ĈEA: pedagogia, gazetara-informa

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

ĪCO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA:

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

Vicprezidanto (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio): Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, tel. 222 780 677 (zápisy, koncepce, metodika)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA): Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinár. vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

Sekretario: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386 (konference, sjezd)

Komitatano: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, hp@ohs.svitavy.cz (kluby a kroužky)

Komitatano: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce, komise)

Kontrolgrupo de ĈEA: Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vapkpe.cz, tel. 466 401 942;

Věra Šlahařová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@komercpoj.cz

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, starto@clavis.cz

Kontrollegis: V. Kočvara, M. Pastrňák, V. Podhradská, P. Polnický

Esperanto-muzeo: Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová, muzeum.ct@worldonline.cz

El la komitata traktado

Novelektita komitato de ĈEA kunvenis la 18-an de januaro en Brno.

Unue estis disdividitaj kompetentoj inter unuopaj komitatanoj (vidu p. 2).

Poste estis taksita la 10-a kongreso de ĈEA. Komitato estis kontenta, nur bedaŭris, ke ĉefan programon, labortraktadon de kongreso, partoprenis eĉ ne 80 membroj. Komitato konsciis atentigojn, kiuj estis proklamitaj dum diskuto, kaj kelkaj estos realigitaj jam en nuna STARTO (ekz. ZEOj). Aliaj restas por venonta laboro. Komitato interesiĝas pri organizo de komuna aranĝo de GEA-kongreso kaj ĈEA-konferenco aŭtune en jaro 2003, diskutis kaj konsentis kun budĝeto por jaro 2003, kiun vi trovos sur paĝoj de STARTO 1/03. Komitato decidis kunigi pedagogian sekcion kaj ekzamenan komision sub komuna nomo pedagogia komisiono. Membroj estas: prezidantino J. Melichárková, membroj - M. Malovec, M. Tomečková, D. Kočvara kaj dum ekzamenoj t.n. konstantaj ekzamenantoj, kiuj povas esti: J. Cink, Z. Hršel, P. Chrdle, V. Kočvara, M. Malovec, J. Mráz, V. Novobilský.

Gvidlibro de CES estos aktualigita kaj je dispono estos aĉetebla, en LIBROSERVO - vidu mendoliston.

Ĉar preskaŭ ĉiuj komitatanoj estas rete atingeblaj, komitatataj kunvenoj okazos en la unua duonjaro entute nur 3-foje.

Sukcesa renkontiĝo de blindula sekcio

En novembro okazis regula renkontiĝo de blindula sekcio en Olomouc. Partoprenis pli ol 20 membroj el diversaj urboj ekz. Havířov, Štramberk, Praha, Olomouc, Brno k.a. Prezidanto s-ano Příborský ĉiujn tre kore bonvenigis kaj sekvis aktualaj informoj, poste ĉiuj rakontis pri komunaj travivaĵoj, ekz. en Ruprechtov, kie la membroj en reka-publiga kuracejo travivis belegajn somerajn tagojn kune kun instruado de Esperanto, pri travivaĵoj el komuna vizito de kongreso en Hungario. La salutvortojn per kazedo sendis prezidantino de AEH s-anino Rýznarová, kiu informis pri kongreso AEH en Jánské Lázně. Neforgesebla estis parolado de nemaljuniĝinta preskaŭ 90-jara vigla s-ano Hanuš el Olomouc. "Ora najlo" estis posttagmeza koncerto en preĝejo de Sankta Mikaelo, kie geedzoj Jelínkovi el Jilemnice prezentis sian muzik-programon.

Sonis spiritaj kantoj en Esperanto kun akompano de orgeno kaj orgenaj variadoj.

La koncerto estis vere arta kaj neforgesebla.

Tutan aranĝon regis amika eĉ familia etoso. Estas necese gratuli al organizantoj kaj deziri ankoraŭ multajn similajn aranĝojn. Venonta renkontiĝo okazos en aprilo 2003 en Prago.

Věra Podhradská

Rozpočet ČES na rok 2003

Příjmy:	2002		2003
	rozpočet	skutečnost	rozpočet
členské příspěvky	100.000,-	77.967,-	90.000,-
prodej knih a mat.	20.000,-	78.168,-	20.000,-
písemné kurzy	10.000,-	3.600,-	5.000,-
předplatné Starto	700,-	260,-	500,-
úroky v bance	300,-	546,-	500,-
dary	20.000,-	13.281,-	20.000,-
konference (sjezd) ČES	60.000,-	54.060,-	55.000,-
OSIEK	1.000,-	0,-	2.000,-
UEA a ostatní (sekce a kluby)	70.000,-	65.120,-	70.000,-
konverzační kurzy	20.000,-	10.120,-	10.000,-
celkem	302.000,-	303.122,-	273.000,-
Výdaje:			
režijní materiál	5.000,-	4.458,-	5.000,-
náklady na prodej knih	8.000,-	15.423,-	45.000,-
cestovné	20.000,-	20.491,-	20.000,-
poštovné	8.000,-	3.772,-	5.000,-
telefon a internet	15.000,-	8.968,-	10.000,-
funkční odměny	7.000,-	7.650,-	7.000,-
nákup služeb	35.000,-	42.876,-	35.000,-
daně	8.000,-	8.145,-	8.000,-
poplatky bance	8.000,-	5.886,-	8.000,-
konference (sjezd) ČES	50.000,-	26.782,-	45.000,-
Starto - tisk a exp.	75.000,-	78.768,-	75.000,-
písemné kurzy	8.000,-	2.550,-	4.000,-
odměny	5.500,-	--	3.500,-
muzeum Č. Třebová	2.500,-	2.500,-	2.500,-
nájem Běchovice	27.000,-	26.668,-	27.000,-
dary a reprezentace	5.000,-	489,-	5.000,-
konverzační kurzy	15.000,-	10.009,-	10.000,-
UEA a ostatní (sekce a kluby)	60.000,-	45.468,-	23.000,-
celkem	362.000,-	310.903,-	338.000,-

Ve výdajích za rok 2002 nejsou započítány 2 faktury (ubytování na sjezdu 20.250,- a nákup PIV 37.500,-), které přišly až v r. 2003.

Ĉeĥa tilio en Malbork

Malbork estas distrikta urbo en norda Pollando kun longa historio, komenciĝanta en 1276. Ĝi estis fondita de la monaĥoj-kavaliroj, anoj de la Hospital-Ordeno de Sankta Maria de Germana Domo = Teŭtona Ordeno, en Pollando oni nomis ilin "krucistoj". La urbo havas 42 mil loĝantojn kaj ĉiujare estas vizitata de duonmiliono da turistoj. Allogas ilin tien krom alia la ege interesa triparta, ruĝbrika kastelo, situanta sur la dekstra bordo de Nogat-rivero, agnoskita en 1994 kiel historia monumento kaj en 1997 honorigita per la enskribo sur la UNESKO-Liston de Monda Kultur-Heredaĵo.

Ĉar inter vizitantoj de Malbork estas multaj konataj homoj el la mondo, i.a. Nobel-premiitoj, diplomatoj, parlamentanoj, politikistoj, sciencistoj kaj kultur-aktivistoj, kiaj estas esperantistoj aŭ apogantoj de la ideo de interkompreniĝo kaj de la pontlingvo Esperanto kreita de eminenta polo Ludoviko L. Zamenhof, loka E-klubo Kastelo kun Urba Konsilantaro prenis la ideon, ke ili plantu en parko Esperanto, en la jaro 2000 nomita "Parko de la Mondo," sian arbeton kaj malkovru la E-memorŝtonon nome de sia

lando aŭ urbo kreante tiamaniere la unikan Parkon de la Mondo. Tio estas komuna kontribuo por proksimiĝo de la nacioj jam antaŭ la plivastigo de Eŭropa Unio.

Al la ideo jam aliĝis elstaraj agantoj kaj E-organizoj kaj dum kelkaj solenaĵoj okazis plantado de la arbetoj kaj inaŭguro de la E-memorŝtono. Ekzemple dum publika solenaĵo la 20-22-an de septembro 2002 partoprenis delegacioj el 12 landoj, inter ili ankaŭ delegacio de Ĉeĥa Fervoja Sekcio IFEF-FISAIC ĈD gvidata de la prezidanto FISAIC ĈD ing. Vojtěch Zelenka, kiu apud la jam plantita tilio malkovris E-memorŝtonon kun surskribo kaj ĉeĥa nacia flago. La iniciato kolekti tiucele monon - por aĉeti kaj lokigi E-monumenton - venis de FS ĈEA dum Jarkunveno de E-klubo en Přešov, per duono de la bezonata sumo kontribuis E-Klubo en Prostějov kaj lastan kvaronon oni kolektis dum lastjara Printempa Konferenco de FS ĈEA en Česká Lípa, al ĉiuj mon-oferintoj do apartenas nia danko.

Resumante la aferon, en Parko de la Mondo, en kies centro staras bela monumento de Zamenhof (inaŭgurita la 11-an de junio 2000 de la urbestro mag. Mieczysław Roeding

kaj vic-urbestrino dr-ino Danuta Stanek-Gutowska, esperantistino), nuntempe troviĝas apud plantitaj arboj jam pli ol dudek ŝtonoj kun surskriboj ĉizitaj en Esperanto, inter ili tiuj de Aŭstralio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉilio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Irlando, Latvio, Litovio, Pollando, Ruslando, San Marino, Svedio kaj aliaj, pri lokigo de la ŝtonoj apud plantotaj arboj traktis aŭ traktas Aŭstrio, Slovenio k.a.

Ĉu vi scias, ke ZEOj en Malbork estas la plej multaj en Esperantujo? Post vizito lastatempa de du sciencistoj, de germana Nobelpremiito Reinhard Selten kaj aŭstralia kandidato por tiu premio, Robin Pope, kiuj la 9-an de novembro 2002 plantis en la Parko de la Mondo arbojn de siaj landoj kaj inaŭguris ŝtonojn kun surskriboj ĉizitaj en Esperanto, la nombro de ZEOj en tiu ĉi urbo kreskis ĝis 27.

Esperanto kaj E-movado en Malbork havas longan tradicion.

En 1909 dum kunveno de la membroj de Orient-Germana Esperanta Ligo ("Ogelo") fondiĝis grupo esperantista de Malbork (Marienburg), kies prezidanto estiĝis apote-kisto H. Mehländer. Nuntempe E-klubo Kastelo kun prezidanto d-ro

Edward Kozyra kunligas ĉ. 40 esperantistojn. E-kunvenoj okazas unufoje monate, E-kurso ĉiusemajne en la Malnova Urbodomo. En la Publika Biblioteko "Bona Novaĵo" troviĝas riĉa Esperanto-Fako ĉe Kristana Baptista Preĝejo apud la placo Zamenhof. Krome unufoje monate okazas Esperanto-Diservo en Katolika Paroĥo de la Descendo de la S-ta Spirito, Str. Nogatowa 7, sabate (14-15 h), poste ĉe la preĝeja klubejo E-renkontiĝo (15-17 h) kun pastro, mag. Eŭgeno Grzesik.

En la urbo ekzistas ankaŭ kafejo "Esperanto", kiu troviĝas ĉe la placo "Esperanto" en la novkonstruita hotelo "Malbork". Ĝian solenan inaŭguron la 10-an de septembro 2002 ĉeestis ankaŭ prof. d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof (nepo de Majstro) kun edzino, plie li tiutage solene metis florojn ĉe monumento Zamenhof kaj solene malkovris E-memorŝtonon ĉe arbo de Francio.

En Malbork oni povas ricevi E-prospektojn senpage, sed por sendita per poŝto oni aldonu 1 IRK (internacia respondkupono) por 1 ekz., 2 IRK por 2-5 ekz. skribante al adreso de Esperanto-Rondo, Str. Mazowiecka 23, 82-200 Malbork. Estas konsilinde antaŭanonci vian viziton de la urbo.

Jindřich Tomíšek

Amika invito al Skokovy

(de 12-a ĝis 18-a majo 2003)

Kia estas la programo? Agrabla gimnastiko en manĝejo, instruado en grupoj, promenoj, ekskursoj, ŝatokupoj, manlaboroj, kantado, joko en gimnastikejo, vespere prelegoj, diskutoj, rakontado, videofilmoj, lumbildoj, amuzaj vesperoj, ludoj, babilado, frandado. Laŭ interkonsento masaĝoj kaj kuracistaj konsultoj. Vi povas elekti programerojn laŭ vetero, gusto, tempo, lingvoscio, ktp. Memoru, ke ni atendas vian prezentadon dum sabata vespero por pliamuzigi etoson.

Kaj la prezo? Modesta. kiel la medio. Ĝis 3.000 Kč. Oni pagas surloke.

Amike atendas viajn demandojn, proponojn, plendojn kaj konsilojn

Jindřiška Drahotová
Sadová 745/36
CZ-293 01 Mlada Boleslav
telefono: 00420/32 6731 845 vespere
ret-adreso: vanekmi@centrum.cz
drahotovaesperanto@seznam.cz

Antaŭ la UK en Svedio atendas vin la
HAMBURGA SOMERO
17. - 25. 7. 2003

Hamburgo, kiel iama riĉa hansa urbo, nun eŭropa grandurbo kun 1.7 milionoj da enloĝantoj, estas urbo kun multaj parkoj, grandega lago en la centro, riverego. Hamburga Esperanto-Societo (HES) pretas gvidi vin esperantlingve al tiaj diversaj vidindaĵoj, al muzeoj, al koncertoj - kaj ankaŭ al kaŝitaj lokoj, kiujn "normalaj" turistoj neniam spertus.

Aranĝu internaciajn sesiojn, konferencojn per Esperanto!

Fine de la pasinta jaro fondiĝis **Fondaĵo por Instruado** (en ĝi laboras inter aliaj ankaŭ tri esperantistoj) kun celo kontribui al plispertigo de ĉiutipaj jam laborantaj kaj estontaj instruistoj, por ke ili povu transdoni al la junularo vivstilon de interkultura akcepto kaj aktiva civitaneco.

La fondaĵo organizas en- kaj eksterlandajn aranĝojn, junularajn interŝanĝojn, konferencojn, seminariojn, studadsesiojn, kaj serĉas internacian kunlaborantaron, kontakton per ESPERANTO!!!

Fondaĵo por Instruado

(Pedagoguskepzesert Alapitvány)

Kazinczy u. 23-27. HU-1192 Budapest, Hungario. Rete: axel@eszperanto.hu

Nova Zamenhof-strato

En Francio, en la urbo "Sainte Savine" (Apud "Troyes" - Departemento "Aube") oni baldaŭ inaŭguros novan straton kun la nomo "Zamenhof - Kreinto de Esperanto". Tion ebligis longaj klopodoj de kelkaj membroj de la Grupo "Esperanto 10".

Tradukado de UEA-dokumentoj

La estraro de UEA havas grandan intereson aperigi en kiel eble plej multe da lingvoj la tiel nomatajn Esperanto-dokumentojn. La kunlaboro povus komenciĝi per la traduko de la Esperanto-dokumentoj 37E, Internaciaj Lingvoj kaj Internaciaj Homaj Rajtoj. UEA, Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Renato Corsetti

Israela astronauto

Israelo kune kun Usono kaj kun la cetera mondo funebras la tragedion de la sep astronautoj de la kosmosipo Columbia. La pereinta israela astronauto Ilan Ramon, kiu estis tre kara kaj unika persono, ne estis nevo de la israela esp. Jehoŝua Tilleman, sed lia duagrada kuzo.

Josef Ŝemer,
Prezidanto de Esperanto-Ligo en
Israelo.

RUSIO

EoLA-15 okazos de la 5-a ĝis la 9-a de marto 2003 en la bazejo "Timurovec", kiu situas en pitoreska loko 40 km for de Novosibirsko.

Ĉefa parto de la programo estos, kiel kutime, la konkursoj:

1. Kanta konkurso (originala kanto, tradukita kanto, la plej bona plenumo, korusa kanto).
2. Poezia konkurso (originalaj versoj, tradukitaj versoj, la plej bona deklamado).
3. Teatra konkurso (teatraĵoj, muzikaĵoj, skeĉoj, humuraĵoj).
4. Urbo de majstroj (manlaboraĵoj).

KROATIO

1-a kaj 2-a lokoj por esperantistinoj en Zagrebo. Stephanie Strunjak, 13-jara kroata esperantistino, bazlernejanino, gajnis la unuan lokon en la decembra enketo de la ĵurnalo "Jutarnji list" por la titolo "Zagrebanino de la jaro 2002". Stephanie gajnis en la fabelkonkurso de la finnlanda Paatalo-instituto per sia fabelo "Bebo formiko savis formikejon kaj renkontis Julavon". Post la gajno ŝi estis

intervjuita de pluraj ĵurnaloj, televid- kaj radiostacioj.

Ankaŭ la duan lokon gajnis esperantistino, 83-jara kaj ege aktiva Sava Matetich-Luchich.

POLLANDO

Esperantotur funkciis kiel Turisma Servo de Monda Turismo dum 30 jaroj (1973-2002) kaj nun pro ekonomiaj kialoj transformiĝis en Internacian Klubon ESPERANTOTUR. De kelkaj jaroj ĝi kunlaboras kun FLUGO, kiu okupiĝas ĉefe pri aviadila turismo, sed ankaŭ pri E-turismo. Por la jaro 2003 estis planitaj pli ol 100 vojaĝoj, el kiuj pli ol 30 internaciaj.

NEDERLANDO

Cseh-metodo laŭ nova sistemo. La Internacia Esperanto-Instituto (IEI) jam de 1929 okupiĝas pri la edukado de novaj instruistoj kapablaj gvidi kursojn laŭ Cseh-metodo. De la jaro 1976 la lernado, kiel gvidi rektmetodajn kursojn, estas dividita en 3 diversgradaj seminarioj (nomataj A, B kaj C). Ekde la 1-a de januaro 2003 ne plu okazos la ĝis nun konataj kiel A-Seminarioj pri Cseh-metodo. Pliajn informojn eblas ricevi rekte de: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; rete: iei001@tiscali.nl.

Atilio Orellana Rojas

Filmo pri Esperanto en Kroatio

Neregistaraj asocioj, kiuj ricevas financon subtenon de la registaro por siaj projektoj, estas invitataj de oficejo pri asocioj de registaro de Respubliko Kroatio publike prezenti sian laboron en Zagreba Foiro dum februaro.

La Kroata Esperanto-Ligo (KEL) prezentos sian projekton "Kurso pri komputilo por geavoj" kaj "Mezeŭropo estas mia hejmo".

Ĉar pluraj asocioj prezentigos per la dokumenta video-filmo, ankaŭ KEL sukcesis aranĝi filmeton pri si. Kroata filmreĝisorino Romana Rozic, kiu memlernis Esperanton, reĝisoris 8,5-minutan filmon per filmmaterialo pri niaj diversaj agadoj. Direktoro de la Kroata Televido Mirko Galic permesis uzi 2,5 minutojn da filmita materialo pri Esperanto-aktivecoj el la arkivo de la kroata televido HRT. Aliaj materialoj venis el amatora fono.

En la filmo pri Esperanto parolas gejunuloj, kiuj en 1996 filmis junularan elsendon "Parlaonica", sekvas pluraj scenoj el la kongreso kaj ne mankas ankaŭ la lastatempaj sukcesoj de Stephanie Strunjak dum gastado en ŝatata televida programo "La vivanta muro". La zagreba premiero de la filmo okazis en januaro 2003 en Esperanto-Societo "Budę Borjan".

*Kroata Esperanto-Ligo
esperanto@zg.hinet.hr*

AGO-SEMAJNO de Varsovia Vento

Post sukcesa AGO-SEMAJNO en Zakopane, Pollando (27-XII-02 - 3-I-03), dum kiu en la landa 50-persona grupo ĉiutage ni klopodis popularigi E-on, Varsovia Vento-Klubo komencis pensi pri sekva AGO-SEMAJNO ĉi-jare, en sama tempo kaj loko, sed jam en la internacia rondo. Je nia dispono estos gasta lernejo en ĉefurbo de vintraj sportoj de Pollando - ni planas la tempon dediĉi al eltrovado de la plej geniaj ideoj popularigi Eon surloke. Helpu al ni prilabori la taskon, eniru nian ideon, por ke Eo estu pli konata de la cetera mondo ol nun. Agu kaj ludu kune kun ni! Detaloj: viavento@poczta.onet.pl

Varsovia Vento - Via Pola Junulara-Klubo Varsovia Vento estas klubo, kies ĉefa agado estas popularigi Eon precipe en medio de la pola junularo. Ĉi-cele ni organizas regulajn renkontiĝojn kun Eo (dum kiuj eblas studi la lingvon), prelegojn, de sep jaroj eldonas land-skale (redaktatan pollingve) informilon pri Eo (TORNADO) kaj organizas diversajn aliajn aranĝojn - du jarojn jam kune kun la lodzaj kaj ŝtaŝovaj samideanoj.

Nia ideo estas kune ludi kaj agi, por ke estu gaje kaj amuze! Ludu do kaj agu kune kun ni!

La kontaktoj: Irmina (landa agado) ikudlata@poczta.onet.pl

la ĉefo:

Irek <viavento@poczta.onet.pl>

Svět knihy 2003

(La Libromondo)

En aprilo okazos ekspozicio de libroj en Prago. La 24-a de aprilo estos dediĉita al Esperanto dank' al iniciato de poetino Věra Ludíková. En vitra kubo estos ekspoziciataj libroj en Esperanto, artikolo pri Esperanto aperos en la katalogo de la ekspozicio kaj en apuda ĉambro realiĝos kultura programo (ekde 15 h), al kiu estas esperantistoj kore invitataj. **Venu!**

Junularo

Nia junulara sekcio ĉesis funkcii kaj en nia membrobazo estas nur 55 gejunuloj naskiĝintaj post 1972. Sed multajn el ili membrigis iliaj gepatroj, kvankam ili mem ne vidigas intereson pri Esperanto. Aliflanke ekzistas infan-rondetoj, kies junaj esperantistoj ne membrigiĝis. Kaj eble ankaŭ per interreto kelkaj interesiĝas pri la lingvo, kvankam ili ne volas organiziĝi. Ĉe aliaj lingvoj ne estas organizado kutima, tamen la junularo lernas tiujn lingvojn, ne nur en la lernejo, sed propravole. Ekstaras de demando, ĉu aktivigi gejunulojn signifas vere altiri ilin al nia organizo? Aliaj lingvoj tion ne faras, ne nur la angla kaj germana. Ĉu ni ne klopodas pri malĝusta celo?

mm

TEJO informas

* Reta kurso **lernu.net** atingis dum monato la nombron de 400 registritaj uzantoj el 40 landoj kaj 8 000 vizitojn!

* La ĉijara Internacia Junulara Kongreso

(IJK) okazos en Lesjofors (Svedio) de la 19a ĝis la 26a de julio.

* Junulara renkontiĝo en Ukrainio, Kijivo, inter la 30-a de junio kaj la 6-a de julio kun kursoj, konkursoj, koncertoj, ekskursoj ktp. Informoj kaj aliĝoj: Mikaelo Lineckij rejo@ukr.net

* Esperanta portalo "Ĝangalo" malfermiĝis ĉe <http://ĝangalo.com>, tre moderna informilo

* Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo <http://www.tejo.org>

* Poresperanta sukceso ĉe Itala Junulara Konvencio. De la 10a ĝis la 12a de januaro okazis en Romo la Itala Junulara Konvencio pri la Estonteco de Eŭropo. Danke al Francesco Maurelli, kiu tie reprezentis Italan Esperantistan Junularon, en la fina dokumento aperas frazo por lingva diverseco kaj por la uzo de neŭtrala internacia lingvo.

* Seminario por Instruistoj en Nederlando. Den Haag (Nederlando), la 7-a-9-a de marto 2003: Internacia Esperanto-Instituto (IEI) okazigas seminarion por instruistoj pri Esperanto-literaturo. Informoj: iei001@tiscali.nl

* Esperantaj Tagoj en Pollando, Staszow, 22-a - 25-a de majo 2003: kun foto-ekspozicio, prelegoj, koncertoj, ekskurso. Informoj: Andrzej Sochacki asochacki@poczta.fm

* Nova kompakta disko: "Elektronika Kompilo", 70 minutoj da aktuala elektronika Esperanto-muziko de 10 artistoj el 8 landoj. Mendilo ĉe <http://www.vinilkosmo.com>

Rapide al Lančov



SET Lančov atendas vin!

La ĉijaraj etapoj okazos en jenaj datoj:

29.6.-12.7.2003

13.7.-26.7.2003

27.7.-9.8.2003

Kursoj ekzistas

- A - por komencantoj
- B - por progresintoj
- C - konversacia

Loĝado en 4-litaj kaj 5-litaj kabanoj. Antaŭtagmeze instruado, posttagmeze naĝado, sportado, ekskursoj (ankaŭ al Vieno), vespere tendar-fajroj, dancado, intertalento, dirmanĉe elektado de simpatiuloj kaj beluloj kaj maska karnavallo. Kotizo por enlandanoj 2500Kĉ, por eksterlandanoj 98 eŭroj.


Laŭ intereso de la aliĝintoj en la tendaro okazos ankaŭ kursoj de aliaj lingvoj, de ŝako, pentro-arto, reiki-gimnastiko. Post la tria etapo estas la tendaro je dispono de feriantoj sen instruado.

Ekskurso al Vieno kostas 220,- Kč (se aliĝos almenaŭ 30 personoj), aliaj ekskursoj estas piedaj (Hardegg, kastelo Vranov, kastelo Bítov, diga muro de la lago, ruinoj de burgo Cornštejn).

Pluaj informoj kaj aliĝoj:

Esperanto, 674 01 Třebíč





Organiza Societo
de Internaciaj
Esperanto-
Konferencoj

INTIMAJ TEMOJ EN LA ESPERANTO-BELETRO



estas la ĉefa temo de la Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK, kiu estas organizota en Prago de la 19-a ĝis la 25-a julio 2003 kun riĉa prelego-matineo, kultura kaj turisma programoj. La konferencejo en la hotelo Opatov (Jižní Město) bonvenigos ankaŭ la pragan verkistino **Eli Urbanová**, kiu komune kun Karolo Piĉ estas la plej grava reprezentanto de kuraĝaj intimajoj en la esperantlingva literaturo. Vi povos aĉeti ŝiajn verkojn kaj akiri ŝian subskribon.

Poznámká: Členové ČES a SKEF mají určité výhody (zlevněný poplatek), bližší informace u Petra Chrdleho (viz vpravo).

Lige al la konferenco okazos pliaj interesaj eventoj:

EKOTUR 2003

Ekoturisma renkontiĝo, ĉijare en Bohemia Karsto, kun loĝado en pitoreska subburga urbeto Karlštejn, de la 13-a ĝis la 19-a de julio.

EKUMENA DISERVO

dimanĉe la 20-an de julio posttagmeze en la preĝejo de Sankta Nikolao en Molnovurba placo en Prago.

Kaj tuj post la konferenco startos

FLUGKARAVANO

26.7. - 6.8.

(komune kun kelkaj eksterlandaj partoprenintoj) al Svedio por partopreni la Universalan Kongreson de Esperanto, kiu dum la reflugo paŭzos por tri tagoj en Danio por ekkoni Kopenhagon kaj ties ĉirkaŭaĵon.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn por ĉiuj ĉi eventoj vi ricevos ĉe:

Petro Chrdle

Anglická 878

252 29 Dobřichovice

rete: chrdle@kava-pech.cz

Multlingveco en Eŭropo

Fakte mi estis vokata kiel itala lingvisto, ne kiel esperantisto aŭ prezidanto de UEA, sed oni sciis pri mia esperantisteco kaj eble oni vokis ĝuste min aldone al aliaj tri italaj lingvistoj krom pro mia defendado de la itala lingvo ankaŭ por eventuale diplomatie ekrilati kun reprezentanto de esperantistoj.

Ĉeestis kvardeko da homoj. El ili trideko estis konataj eŭropaj lingvistoj (eble vi konas la nomojn de David Crystal kaj de Robert Phillipson) kaj reprezentantoj de naciaj lingvo-instancoj (British Council, Alliance Française, ktp.).

La temo estis pri la ligo inter lingvo kaj kulturo, ĉu ĝi ekzistas kaj ĝis kiu grado? Fakte oni volis sondi opiniojn pri tio kaj kompreni, kiel la publiko reagus al reduktado de la lingvoj uzataj de la eŭropaj instancoj, ankaŭ antaŭvide de la plilarĝiĝo de la Unio. La reago plimulte estis: jes, ekzistas ligo inter lingvo kaj kulturo kaj bonvolu forgesi pri reduktado de lingvoj. Eŭropo estas multlingva aŭ ĝi entute ne ekzistos. La problemo ne estas redukti la lingvonombrojn, sed pliiĝi ilin (inkluzive, ekzemple, de la kataluna kaj de la kimra, kiuj nun ne estas konsiderataj).

La temo pri Esperanto ne leviĝis en la pleno. Tie ĉiuj energioj estis kontraŭ la uzo de interlingvo ("lingua franca" =

la angla), kaj do ne povis aperi Esperanto. Sed la temo tamen leviĝis en pluraj diskutantaj subgrupoj, kaj kun mia ĝojo mi povis persone konstati, ke la granda laboro farita ĉe lingvistoj efikas. Esperanto havas multe pli da amikoj en tiu medio, ol ni supozas (Phillipson, Ammon, Voigt, Durand estas kelkaj nomoj, sed estis ankaŭ aliaj). Iuj, ekzemple Voigt, provis konvinki min, ke esperantistoj okupiĝas pri lingvaj homaj rajtoj, ktp.

Do, entute la kunveno estis pozitiva por nia afero, ĉar kelkaj amikoj de Esperanto firmiĝis kaj vidis, ke ankaŭ aliaj subtenas ĝin.

Aliflanke mi ankaŭ lernis lecionon: la movado por Esperanto estas io tre komplika. Por alveni eĉ al malfinaj ekvenketoj, kia povus esti la serioza konsidero de Esperanto fare de EU-instancoj, oni bezonas samtempe plurajn elementojn. "Samtempe" estas ĉi-tie la ŝlosila vorto.

* Pravas tiuj, kiuj opinias, ke ni devas informi pri Esperanto kaj disvastigi ĝin. Sen esperantistoj ne estas Esperanto. Banala vero, kiu tamen devas esti ripetata. Neniu serioze konsideros nin, se ni restas tre malgranda grupo. Imagu, ke vi estas eŭropa parlamentano kaj venas delegitaro de la "Laste Reformita Budhismo" kaj donacas al vi tre belan teologian studon, kiu pruvas, ke la Laste Reformita Budhismo estas la plej perfekta religio en la mondo, kaj petas, ke oni akceptu ĝin en

EU kaj lingvoj

Eŭropo. Vi verŝajne ĝentile ridetus kaj farus paroladeton de la speco "Via okupiĝo pri la radikoj de la homa spirito estas io tute kongrua kun la idealoj pri paco kaj evoluo, ktp., ktp., sed nun bonvolu pardonpeti, ĉar mi devas foriri al vera kunveno".

* Pravas tiuj, kiuj opinias, ke oni devas kontakti politikistojn (sed vidu ĉi-supre). Ni ne devas konvinki nur la prezidanton de la Komisiono, al kiu multaj esperantistoj skribas. Ni devas konvinki parlamentanojn je ĉiuj niveloj en ĉiuj landoj. Bedaŭrinde, ofte la provo konvinkadi ilin ne kuniras kun la punkto "Fortigo de la movado, plimultigo de la esperantistoj".

* Pravas tiuj, kiuj opinias, ke oni devas kontakti sciencistojn kaj lingvistojn. Ili estas la fakuloj, kiujn oni vokos, kiel en ĉi tiu okazo. Mi volos, ke sur mia tombo estu la skribo "Sukcese provis paroli la simplan Fundamentan Esperanton kaj malsukcese atendis la tutan vivon la organiziĝon aŭ la organizigon de esperantistaj lingvistoj en ĉiuj landoj". Mi bedaŭras, sed ofte la homoj, kiuj zorgas pri la unuaj du punktoj (la tiel nomataj simplaj esperantistoj), ne interesiĝas, aŭ ne povas okupiĝi pri la tria punkto. Same respondecaj tamen estas la "malsimplaj esperantistoj", kiuj ofte ne volas havi ion komunan kun la normala movado.

* Pravas tiuj, kiuj opinias, ke oni devas konkrete apliki Esperanton. Se la internacia komerco de uzitaj lav-

maŝinoj (intence neekzistanta ekzemplo) okazus en Esperanto, tio estus multe pli granda puŝo por Esperanto, ankaŭ en tiaj lokoj, kiel la Eŭropa Komisiono, ol la fakto, kiun mi daŭre citas, ke ekzistas la traduko de Kalevala en Esperanto ("Kalevala estas speco de finlanda Mastro de la Ringoj, ĉu ne?" - estas ofte la reago post miaj klarigoj).

* Malpravas, se ili permesas, tiuj, kiuj opinias, ke oni ne akceptas Esperanton pro la supersignoj. Se oni juĝus internacian lingvon laŭ la skribo, la angla neniam estus akceptita. Konklude ĉiuj supraj pravoj estas nur partaj kaj validas nur en kunligo inter si. Esperanto havas multajn amikojn, sed ĝi ankoraŭ bezonas nian laboradon sur ĉiuj kampoj. Neniel gravas la speco de la rimedoj. Oni ja uzu la plej modernajn komputilojn kaj la retajn eblecojn, sed gravas, ke oni uzu ilin por ĉiuj elementoj supre viditaj: informado al simplaj homoj, informado al politikistoj, informado al lingvistoj, instruado de Esperanto kaj aplikado de ĝi. En la praktiko ĉiu faru tion, kion li kapablas fari. Ĉiu faru tion unue en sia vilaĝo, poste en sia lando kaj nur poste skribu al Bruselo. Sed la organizaĵoj zorgu, por ke daŭre estu ekvilibro inter la pluraj elementoj. Sen tio samtempe en ĉiuj eŭropaj landoj ni neniam konkeros la fortikaĵon de EU-instancoj.

Renato Corsetti

Kiel funkcias lingvoj en Eŭropa Unio?

Eŭropa Komisiono (EK) en Bruselo uzas ĉ. 1300 tradukistojn kaj 530 interpretistojn, kiuj tradukas inter ĉiuj 11 lingvoj de EU. Ĉiu tradukisto transdonas ĉiutage kvin normopaĝojn (en 2001 ili tradukis 1 268 000 paĝojn). La tuta EU utiligas ĉ. 3000 tradukistojn kaj 800 interpretistojn. Ĉiuj tradukas el fremdaj lingvoj en sian gepatran, nur escepte inverse (ekz. el la finna). La kandidatoj por tradukado bezonas universitatan edukon, ilia konkurso daŭras dek monatojn, dum kiuj ili devas pruvi, ke ili kapablas tradukadi sen vortaro kaj kun vortaro, en la gepatran lingvon kaj el la gepatra. Enketaj interparoloj celas testi ilian ĝeneralan klarecon. La traduka laborejo disponigas al la tradukistoj milojn da vortaroj kaj komputilan datumbazon kun 5 milionoj da vortoj en ĉiuj lingvoj de Eŭropa Unio kaj en latino. La tradukistoj estas dividitaj je 6 grupoj (1. juro, ekonomio; 2. agrikulturo, fiŝado; 3. dogano, humanisma helpo; 4. telekomunikado, industrio; 5. socialaj aferoj; 6. statistiko, politiko). Specialigo estas avantaĝa por rutina tradukado, sed terure enuiga por tradukistoj, kiuj dum dudek jaroj tradukas nur unu temon (ekz. fiŝadon). Sekve ne ĉiuj tradukistoj emas labori en EK.

En Eŭropa Parlamento (EP) ĉiu

parlamentano rajtas paroli en sia gepatra lingvo kaj aŭskulti aliajn en sia gepatra. Oni postulas, ke ĉiu interpretisto interpretu nur en sian gepatran lingvon. De malpli disvastigitaj lingvoj oni interpretas tra angla aŭ alia konata lingvo, kio kaŭzas pli grandan malfruigon kaj deformon de informoj. Por komencaj interpretistoj estas tia laboro tiom laciga kaj konfuziga, ke unue oni trejnas ilin en mutaj kabinoj, kie la komencanto interpretas por ekzamenantoj, sed la parlamentanoj lin ne aŭdas.

Ĉi tiujn informojn alportis gazeto TOP (por ĉeĥaj kaj slovakaj tradukistoj kaj interpretistoj) en siaj aŭtunaj numeroj 2002. Laŭ nia opinio Esperanto povus helpi - sed necesus eduki universitate klerajn tradukistojn kaj precipe ellabori bonegajn kaj ampleksajn vortarojn kaj datumbazojn kompareblajn kun la anglaj kaj alilingvaj.

mm

Alvoko por praktikaj kunlaborantoj.

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) serĉas volontulojn por laborgrupo pri mallongaj tekstoj cele al novaj eŭroparlamentaj demandoj pri la uzado de Esperanto aŭ la esploro de ties eblecoj:

1. esploro de uzado de Esperanto kiel pontolingvo por tradukado;
2. esploro de la eblecoj de neŭtrala lingvo kiel Esperanto.

Bezonataj estas kunlaborantoj, kiuj pretas tradukadi, dissendi leterojn k.s.

**Knížní služba
Českého esperantského
svazu
NABÍDKA ZBOŽÍ
pro rok 2003**

(1. vydání)

Zboží uváděné v tomto seznamu si můžete objednat na adrese:

LIBROSERVO ČES
C/o: Zdeněk PLUHAR
Lamačova 658/6
152 00 PRAHA 5 - Hlubočepy
Tel.: 251 817 732
E-mail: m.pluharova@tiscali.cz

Při větších nákupech poskytujeme množstevní slevy takto: při odběru zboží

nejméně za	se poskytuje sleva
200,00 Kč	10 %
500,00 Kč	15 %
1 000,00 Kč	20 %

Výše uváděné slevy poskytujeme jak klubům esperantistů tak i jednotlivým členům ČES při prodeji na fakturu. Tyto slevy neplatí pro prodej do zahraničí a při prodeji ve stáncích Knížní služby (Libroserva) během sjezdů, konferencí a ostatních setkání esperantistů.

Ceny uváděné v tomto seznamu v Kč (v záorce za titulem) jsou zvýhodněnými cenami pro členy ČES v tuzemsku a neplatí pro prodej do zahraničí!

Při zásilkové službě (tj. posílání zboží poštou) připočítáváme k ceně zboží expediční náklady, tj. poštovné a balné.

Upozorňujeme, že některé zboží je na skladě jen v omezeném množství. Objednávky vyřizujeme v pořadí, v jakém nám docházejí, až do vyčerpání zásoby. Ne vždy můžeme zaručit dodatečnou dodávku, zvláště u starších nebo zahraničních vydání.

Platit je možno buď poštovní poukázkou A-V na kterémkoliv poštovním úřadě, nebo pokladní složenkou u kterékoli pobočky Komerční banky. Číslo účtu Českého esperantského svazu

je 3330-021, kód banky (KB) je 0100; jako variabilní symbol se uvádí číslo faktury.

Těšíme se na Vaše objednávky!

Upozornění: Český esperantský svaz není plátcem daně z přidané hodnoty!

Aktuální nabídka:

Průvodce Českého esperantského svazu (nejnovější verze na požádání - 10,- Kč)

1. Učebnice a příručky k jazykovým zkouškám

1.04 Chrdle - Chrdlová: Esperantem za tři měsíce (69,00). Netradičně pojatá učebnice esperanta obsahující i konverzační a čítankovou část. Umožní i samoukům osvojení esperanta v dostatečné míře pro běžnou konverzaci, čtení esperantské literatury i poslech esperantského vysílání rozhlasových stanic.

1.05 Cink: Cvičebnice esperanta pro pokročilé (24,00). Učebnice vhodná i pro samouky. Je také používána v písemných kurzech pro pokročilé pořádaných ČES.

1.06 Vondroušek: Historie a spisovatelé (10,00). Stručný nástin dějin plánových jazyků, esperantského hnutí a písemnictví. (Česky).

1.07 Vondroušek: Historio kaj biografioj (10,00). Obdoba knížky 1.06 v esperantu.

1.09 Kilian: La Mondo Rakontas (LMR) (10,00). 50 povídek z 5 světadílů. Malá čítanka pro mírně pokročilé.

1.10 Kamarýt: Historio de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio (20,00). Dějiny čs. esperantského hnutí od jeho začátku v 19. století až po jeho násilné potlačení komunisty v 50. letech 20. století.

1.16 Malovec: Gramatiko de Esperanto (Dua eldono pilargigita) (130,00). 2. rozšířené vydání známé a oblíbené mluvnice esperanta. Vhodné jak pro přípravu ke zkouškám tak pro zájemce o hlubší studium.

2. Slovníky

2.01 Kilian: 808 nejužívanějších slovních kmenů v mezinárodním jazyce esperanto (8,00)

2.02 Esperantsko-český a česko-esperantský slovníček (10,00)

2.03 Hromada: Esperantsko-český a česko-esperantský kapesní slovník (20,00).

2.04 Bří Filipové: Velký slovník česko-esperantský (20,00)

2.05 Kraft - Malovec: Slovník esperantsko-český (129,00). Slovník středního rozsahu obsahující asi 28 tisíc termínů.

2.06 Kraft: Slovník česko-esperantský. (188,00). Slovník navazující na slovník 2.05. Obsahuje 23 566 hesel (220 472 slov) a je největším česko-esperantským slovníkem.

2.07 Rybář: Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj (10,00). Systematicky řazený terminář hydraulických mechanismů. Definice v esperantu, přičteny výrazy anglické, české, francouzské, německé a ruské.

2.08 Traxler: Česko-esperantský právnícký slovník (25,00)

2.09 Traxler: Esperantsko-český právnícký slovník (25,00)

Viz též 6.18 a 6.23!

3. Povídky, romány a jiná próza

3.01 Čapek: Milito kontraŭ Salamandroj (95,00). Známy Čapkův román, který dodnes neztratil nic ze své aktuality. Výborný překlad J. Vondrouška.

3.02 Čapek: La blanka malsano (60,00). Světověznámá divadelní hra K. Čapka v překladu T. Kiliana.

3.04 Kožík: Lumo en tenebroj. Dolorplena kaj heroo vivo de J. A. Komenský (26,00) Kožíkovo dílo o J. A. Komenském, doplněné o části "El la saĝo de Komenio" a "Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro".

3.05 Hašek: Ne nur soldato Ŝvejk (126,00) Ukázky z díla známého českého humoristy v překladech S. Kamarýta, J. Patery a V. Váni.

3.07 Echtner: Sep tradukoj (13,00). Esperantské překlady V. Echnera pro knihu "Ĉeĥoslovaka Antologio". Ukázky z děl A. Jiráska, J. Zeyera, F. Šrámka, H. Malířové, A. M. Tilschové, J. Š. Baara a J. Vrby.

3.13 Rumler: Abunde kaj redunde (4,00) Esej o různých stylech v esperantu. Přídavkem glosář synonym Pražské literární školy.

3.17 Havel: Aŭdienco (42,00). Známa divadelní hra českého dramatika, někdejšího disidenta a nyní už bývalého prezidenta ČR.

3.20 Kurisu Kei: Co mi dala česká literatura (30,00). Vyznání významného japonského bohemy ze svého vztahu k české literatuře. Popisuje i úskalí cenzury, které poznal při překladu děl K. Čapka, J. Haška, J. Fučíka a dalších českých spisovatelů.

3.21 Benoit Philippe: Badenlanda Legendaro de la Konstanca Lago (126,00)

105 krátkých pověstí z Badenska, jedna z nich se vztahuje k Mistru Janu Husovi. V úvodu uvedena též část písně o Husovi. Jako ilustrace použity kresby M. Alše.

3.22 Foglar: La knaboj de Kastora Rivero (50,00). "Hoši od Bobří řeky" nejznámějšího českého spisovatele pro mládež, jehož romány hlavně ze skautského prostředí čte už 3. generace, v esperantském překladu od D. Berndta.

3.23 Joseph d' Arbaud: La besto de Vakareso (98,00). Neuvěřitelný příběh z počátku 15. stol., který se stal na svoji dobu vzdělanému strážci dobytka.

3.24 Tvarožek: Ŝercoj 1. (12,00).

3.25 Tvarožek: Ŝercoj 2. (12,00).

3.26+ G. Pausewang: La lastaj infanoj de Oldrovalo (57,00). Román-fikce o světě po zničující světové válce. Vzrušující protiválečná knížka přeložená z němčiny do esperanta J. Giessnerem.

3.27+ Astrid Lindgren: La Fratoj Leonkoro (95,00). Původní pohádka autorky o dobru a zlu, plná poezie. Pohádka, která může něco říci nejen dětem, nýbrž i dospělým. Překlad ze švédštiny K. Rohdin, obrázky I. Wikland.

4. Básně, sbírky básní

4.01 Eli Urbanová: El subaj fontoj (16,00) Druhá sbírka básní Eli Urbanové dávající nahlédnout do intimního světa ženské duše.

4.02 Eli Urbanová: Peza vino / Těžké víno (39,00) Sbírká intimně laděných básní proslulé esperantské básníčky, v zrcadlovém vydání s českým překladem od J. Rumlera.

4.03 Karen (Kořinek) - Rumler - Urbanová - Vidman: Kvarfolio (4,00) Výběr z veršů pražských básníků-esperantistů.

4.05 Kořinek: Elektro el la originalaj kaj tradukitaj poemoj (5,00). Připojen životopis J. Kořínka od V. Novobilského a stručné údaje o básnících, jejichž básně jsou v překladu uvedeny.

4.07 K. H. Mácha: Majo (62,00). Máchův "Máj" ve výborném překladu od T. Pumpra.

4.09 Věra Ludíková: Ekaŭdi la animon / Uŝlyŝet duŝi (96,00). Již čtvrtá autorčina sbírka básní, tentokrát vydaná zrcadlově s výborným esperantským předkladem od M. Malovce a J. Mráze.

4.10 Gazda: Frenzetajoj (10,00)

4.12 Věra Ludíková: Uŝlyŝet duŝi 1 + 10 (96,00) Nejkrásnější báseň ze sbírky "Ekaŭdi la animon / Uŝlyŝet duŝi" (katalog. čís. 4.09) ve svém českém originále spolu s uměleckým překladem do dalších 10 jazyků: angličtiny, čínštiny, francouzštiny, italštiny, němčiny, polštiny, ruštiny, slovenštiny, španělštiny a esperanta.

4.13 Věra Ludíková: Uŝlyŝet duŝi 1 + 16 (96,00) Báseň ze 4.12, tentokrát se 16 překlady, i do neindoevropských jazyků. Jedním z jazyků i esperanto.

4.15+ Zdenka Bergrová: Slova noci (50,00) Sbíрка básní s ilustracemi Věroslava Bergra.

4.16+ Zdenka Bergrová: Vortoj de la nokto (100,00) Sbíрка básní 4.15+ v překladu do esperanta od Jaroslava Mráze a s ilustracemi Věroslava Bergra.

5. Zpěvníky

5.01 Cink: Societa Kantareto (24,00) Zpěvník vydaný pro 43. kongres IFEF v Olomouci roku 1991. Uvedeny nejspěšnější písničky z předchozích zpěvníků J. Cinka. Navíc zařazena "Železničářská píseň".

6. Odborná knihovna

6.01 Kolekto de la referajoj el la internacia

seminario (10,00) "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1982". Zaměření přednášek: Energie - celosvětový problém. Odborný jazyk a terminologie.

6.02 Kolekto de la referajoj el la internacia seminario (30,00) "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1989" Zaměření přednášek: Železniční doprava. (Zlevněno ze 45,00!)

6.03 Werner: Terminologia Kurso (20,00) V Česku jediná snadno a levně dostupná příručka v esperantu pro terminologickou práci.

6.04 Tüma: La fundamentaj konsideroj de la scienco pri la varmo (9,00) Kurz termodynamiky s četnými grafy a matematickým aparátem jen na nezbytné úrovni.

6.05 Internacia Seminario pri Komenio (10,00) Sborník přednášek ze semináře pořádaného na počest 400. výročí narození J. A. Komenského, v rámci Předkongresu UEA v Praze 1992.

6.06 Maxwell - Preotu - Tacu: Lingvo kaj kibernetiko (142,00) Sborník prací podávající různé pohledy kybernetiků na jazyk v jeho obecně lingvistické rovině. Psáno převážně dvojjazyčně, hl. v esperantu, dále angl., francouzsky a rumunsky.

6.07 Chrdle (ed.): La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto (147,00)

Sborník přednášek předních interlingvistů a esperantologů přednesených na mezinárodním kolokviu v Praze v červenci 1994.

6.09 Chrdle: Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj (38,00) Popis zkušeností získaných při profesionálním používání esperanta ve srovnání s jazyky národními. Největší část věnována užití v turistice a nakladatelské činnosti, s nimiž má autor bohaté zkušenosti.

6.10 Yosimi Umeda: Jak úspěšně vyjednat s Japonci (30,00) Japonská mentalita, její pozadí, role náboženství v životě Japonců, jak se rozhodují a co předchází jejich rozhodnutím. Co vše je nutno mít na paměti, pokud chce být člověk v jednání s nimi úspěšný.

6.11 Vogelmann: La Nova Realismo (III) (150,00) Osobní intimní vědomí, že všechno, co se děje kolem nás, má svůj smysl, že člověk není samoučelný, to je společně bohatství seriozního věřícího i seriózního ateisty. Na tomto základě je postaveno filozofické dílo německého myslitele, přeložené již do 25 jazyků.

(Vázané, reprezentativní vydání).

6.12 Vogelmann: La Nova Realismo (II) (63,00) Kniha 6.11 v brožovaném provedení.

6.17 KAEST ' 98. (15,00) Program a souhrny přednášek kolokvia AEST konaného v Praze 1998. Viz též 6.22!

6.18 Středa: Terminaro de feloj / Názvoslovní kuži (126,00) Systematicky uspořádaný slovník s definicemi v esperantu a češtině, dále uváděny ekvivalenty anglické, německé, španělské, ruské a slovenské. Každý jazyk má také abecední rejstřík.

6.19 Frank a spol.: Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko - 6. (880,00)

Sbírka článků z oboru z let 1973 - 1992, převážně německy a v esperantu.

6.20 Frank a spol.: Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko - 7. (880,00)

Sbírka obsahuje některá obsáhlejší díla z oboru a řadu kratších prací.

6.22 Modernaj rimedoj de komunikado (150,00) Sborník přednášek z konference AEST Praha 1998. Red. M. Malovec. Hlavní téma: Modernaj rimedoj de komunikado. Vedlejší témata: Terminologiaj problemoj de aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko. Scienco kaj tekniko generale. Vydal KAVA-PECH 1999.

6.23 Werner: Matematika vortaro Esperanta--ĉeĥa-germana (20,00) Trojjazyčný matematický slovník esperantsko-česko-německý s českým a německým rejstříkem (3722 termínů).

6.24 Fakaj Aplikoj de Esperanto (150,00) Sborník přednášek z konference AEST, Praha 2000. Red. Z. Pluhař. Hlavní téma: Ekonomio sojle al la tria jarmilo. Vedlejší témata: Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de

Esperanto. Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko (ĝenerale). Vydal KAVA-PECH 2001.

7. Mapy

7.01 Poŝatlaso Praha (15,00) Kapesní atlas (plán) Prahy vydaný pro 81. světový kongres esperanta v Praze 1996 (Zlevněno z 25,00)

8. Nosiče zvukového záznamu

KA - mag. kazeta, CD - komp. disk, GD - gramofon. deska

8.01 KA: Team en Esperanto (58,00) 10 písní známé slovenské rockové skupiny "Team" nazpívaných v esperantu.

8.02+ KA: Famaj kantoj por belaj horoj (57,00) Znamé operní a operetní árie zpívané v esperantu K. Kudlíkovou a M. Smyčkovou, na piano doprovází J. Zimmel.

8.03+ KA: Kantoj de l' popolo (57,00) Slovenské lidové písně nazpívané v esperantu.

8.04+ CD: Kantoj de l' popolo (115,00) Lidové písně nazpívané v esperantu.

9. Odznaky

9.01 Esperantská hvězdička v bílém kruhovém poli, průměr 7 mm. (5,00)

9.02 Esperantská hvězdička v bílé kruhové výseči, pod ní v oblouku (5,00) nápis

ESPERANTO, 10 x 17 mm.

9.03 Odznak esperantistů-zdravotníků. (5,00)

9.04 Odznak Českého esperantského svazu (5,00) (Zlevněno z 10,00 !)

0. Pohlednice a ostatní zboží

0.01 Pohlednice "Saluton el Praha" . (2,00) Motivy: Staroměstská radnice, Václavské nám., pražské mosty, Karlův most.

0.02 Pohlednice "Saluton el kongresurbo Praha" (2,00). Motivy: Palác kultury (nynější Kongresové centrum) a Žofín.

0.03 Pohlednice "Saluton el kongresurbo Praha" (3,00) Motivy: Kongresové centrum a Žofín. Na rubu text aktualizovaný pro 81. světový kongres esperanta v Praze 1996.

11.01.2003

zp

P.F. 2003

Ikare
zpevni křídla
ať doletíš
k cíli

pozdravuj
skřivánky
Šťastný návrat
bratře

Āestmř Vidman

Honorigo por Zdenka Bergrová

Āeĥa poetino kaj tradukistino, kies poemaro **Vortoj de la nokto** en traduko de Jaroslav Mráz aperis okaze de nia asocia kongreso, ricevis gravan distingon: **Diplomono de Masaryk-Akademio de Artoj**. Per ĉi tiu diplomono (kiun jam ricevis Zdeněk Mahler, Jiří Kolář, Václav Hudeček, Vlastimil Brodský kaj Luciano Pavarotti) la akademio aprezis precipe la traduk-laboron de Zdenka Bergrová, kiu tradukis en la ĉeĥan rusajn klasikulojn (Puŝkin, Nekrasov, Dostojevskij, Jesenin).



P.F. 2003

Ikaro
firmigu flugilojn
por atingi
la celon

Salutu
alaŭdetojn
Feliĉan revenon
frato

Āestmř Vidman

Esperanto venkis ĉe Pola Radio!

Laŭ komparaj statistikoj ĉe Pola Radio, jam de pluraj jaroj Esperanto-redakcio ricevas la plej multajn leterojn, retmesaĝojn, ktp. La nombroj de la mesaĝoj en la lastaj 4 jaroj estas:

loko redakcio	2002	2001	2000	1999
1-a Esperanto	2599	2728	2048	2308
2-a germana	509	682	925	795
3-a angla	455	482	477	567

La komparaj statistikaĵoj de la lastaj 4 jaroj estas ankoraŭ pli imponaj ol nur la statistikaĵo de la Esperanto-redakcio, ĉar oni klare povas vidi, ke la germana kaj angla redakcioj havis mal-kreskon.

RET-INFO laŭ Leopold Patek

La 35-a Internacia Infana Kongreseto

okazos en Lerum, Svedio, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aĝosto 2003. Ĝi realiĝos en apudlaga feria centro Knappekulla, en la komunumo Lerum, 18 kilometrojn oriente de Gotenburgo.

LIBELOJ

Oldřich Arnošt Fischer

Ordo Libeloj, latine Odonata, estas grupo de belegaj kaj okulfrapantaj insektoj. La libeloj havas malnovan genealogion. Jam en mezozoiko flugadis super marĉejoj kun praarbaroj de likopodioj kaj ekvizetoj grandegaj pralibeloj. La pralibelo de genro *Meganewa* havis en disetendo de flugiloj preskaŭ sepdek centimetrojn. Restiĝojn de pralibeloj oni trovas en karbo, sukceso kaj sedimen-taj minaĵoj.

La libeloj havas kelkajn anatomiajn specialaĵojn. Korpo de libelo konsistas el kapo, torako kaj postajeto.

La kapo de libelo havas du grandajn, okulfrapantajn okulojn, du malgrandajn antenojn kaj mordan buŝan aparaton. La okuloj konsistas el multaj unupartaj okuletoj.

La torako de libelo konsistas el tri segmentoj. El ĉiu segmento elkreskas unu paro de gamboj.

La libelo havas du parojn de flugiloj, kiuj elkreskas el dua kaj tria segmentoj de torako. Tiuj du segmentoj estas kunkreskitaj. Ili tial formas tiel nomatan simtorakon. Rilate la unuan segmenton la simtorako staras oblikve. Oblikva pozicio de simtorako kaŭzas, ke la flugiloj kompare al aliaj insektoj ne estas direkte super la gamboj. Tian pozicion de torakaj segmentoj oni trovas ĉe neniu aliaj insektoj.

Laŭ formoj de flugiloj oni distingas du subordojn de libeloj. Libeloj de subordo Zygoptera havas

proksimume egalajn formojn de antaŭaj kaj malantaŭaj flugiloj. Libeloj de subordo Anisoptera havas malantaŭajn flugilojn pli larĝajn ol antaŭajn flugilojn.

Laŭ tipo de flugado la libeloj apartenas al malnova grupo Paleoptera. Tio signifas, ke ĉiu flugilo de libelo povas labori aŭtonome kompare al grupo Neoptera (ekzemple muŝoj, kuloj kaj skaraboj), kie flugiloj laboras komune, en paroj.

La postajeto de libelo havas dek unu segmentojn. La dua kaj tria segmentoj de postajeto de masklo portas falsajn seksajn organojn. Ekstremo de maskla postajeto, la dek unua segmento, portas eksternajn generilojn, preniletajn populaciajn organojn.

La libeloj flugas tre bone. Ili kapablas ne nur stari en aero en unu loko, sed ili kapablas eĉ flugi dorsdirekten.

Oni ofte komparas libelojn kun aviadiloj. Sed libelo estas fakte konstruita pli perfekte ol moderna aviadilo. Ekzemple la aviadilo povas levi ŝarĝon, kiu pezas 1000 kilogramojn. Sed motoro de la aviadilo havas potencon de multaj ĉevalfortoj. Se la libelo estus same tiel granda kiel la moderna aviadilo, ĝi bezonus por transporto de sama ŝarĝo nur kvar ĉevalfortojn. La libelo tial flugas pli ŝpareme ol la aviadilo.

La libeloj estas rabaj insektoj. Eminentaj ĉeĥa entomologo František Klapálek eĉ nomis libelojn "akviloj inter insektoj".

La libeloj estas insektoj kun neperfekta tipo de evoluo. Tio signifas, ke ili ne havas stadion de ĥrizalido. Evolua ciklo de libeloj konsistas nur el tri stadioj: ovetoj, larvoj kaj imaginoj.

EK Olomouc

Ĝenerala kunveno de Esperanto-klubo en Olomouc okazis la 26.11.2002. La ĝisnuna komitato de la klubo estis reelektita sen pli grandaj ŝanĝoj. S-ano Bohuslava Pelclová, kiu antaŭnelonge atingis gravan vivjubileon, estis elektita kiel honora prezidantino de la klubo pro sia multjara oferema laboro en la Esperanto-movado.

La ĝeneralan kunvenon partoprenis ankaŭ prezidanto de Patrujsciencia muzea asocio en Olomouc s-ro doc. PhDr. Jiří Musil, kiu informis pri la propono krei en la muzea asocio sekcion okupiĝantan pri historio de la Esperanto-movado en regiono Olomouc. La ĉeestantoj akceptis kun ĝojo ĉi tiun informon kaj esprimis intereson partopreni en laboro de la menciita nove kreata muzea sekcio.

Dr. V. Mohapl

“Dyt’ je nás málo”

Ano, je nás málo. A nejenom esperantistů jako takových, ale hlavně platících členů ČES.

Co s tím? Líbil se mi nápad, který zazněl na schůzi výboru ČES v Brně (18. ledna 2003). Nevím, kdo ho vyslovil. To asi není důležité. Důležitá je myšlenka. Říkejme jí 1+1 nebo duoble, to je jedno. Hlavní je, že by každý člen ČES měl získat jednoho nového platícího členu. Pochopitelně, přivede-li 3 nebo 5 nových členů (raději členek), bude to jenom ku prospěchu věci.

Ano, je nás málo. Moje babička říká-

vala: “Nebřeč nad rozlitym mlíkem.” Co tedy ještě můžeme udělat? Kromě akce “duoble”(nebo 1+1) bych doporučil posílat lidi (hlavně mladé neesperantisty) na tábory. Proč máme **Lančov**? V Třebíči jsou šikovní a schopní, ale máme je v tom nechat plácet..

Máme však i sekce. Naše nejuspěšnější sekce – katolická má jistě svůj tábor (to neznamena, že nemá posílat lidi **do Lančova!**) a další možnosti, jak získat nové “lidské zdroje”. Nejmladší sekce, sekce informatiky najde určitě rezervy užitečných i použitelných lidí. Ovšem ani ostatní sekce by neměly zůstat stranou, ale hledat nové členy nejen pro svoji sekci, hlavně však pro svaz.

Ano, je nás málo. Není však důvod k panice. Ted’ záleží na každém, opravdu na každém z nás, jak se bude umět rozhlédnout ve svém okolí a hledat, hledat. Pánové V+W zpívali: “To by tak hrálo, ‘dyt’ je nás málo, vopuštěný sme dočista..” a dále: “Nejlepší odpověď’ pro panikáře je pádná odpověď’ přes obě tváře..” /jenom prosím – žádné násilí při získávání nových duší/

Jan Fidel Řepa

P. S.

Vzkaz pro věčné rejpalý typu: “Ten zase kecá. A co udělal on?” Zodpovědně prohlašuji, že ode mne pojedou letos na Lančov nejméně 3 účastníci. (Musím přiznat, že někteří budou dělat angličtinu – podstatná však je podpora Lančova). Ještě něco: děkuji všem, kdož dočetli až sem.

Ankoraŭ pri la Nova PIV

Mi ne povas kompari la novan PIV kun la malnova, ĉar mi havas nur la novan, kvankam mi la malnovan multajn jarojn strebis akiri, sed vane. Mi ne esploris la novan PIV paĝon post paĝo kaj vorton post vorto, sed nur hazarde mi trovis en ĝi krom preseraroj kelkajn mankojn, misinformojn, surprizajn novismojn k. s.

Ekzemple en la tabelo de Mendelevo mankas heliumo. Oni skribas, ke Bonespera Kabo estas la plej suda kabo de Afriko, kio ne estas vero, ĉar la plej suda estas Nadla Kabo. Pri Borneo kaj Sumatro oni skribas "La plej granda el la Sundaj Insuloj", kio ja povas esti vero nur pri unu el ili, nome pri Borneo. Eĉ nur la indonezia parto de Borneo estas pli granda ol la tuta Sumatro. Simile pri Erfurto kaj Vajmaro oni skribas "Ĉefurbo de Turingio". En tiu ĉi kazo mi ne scias, kio estas vero. Ĉe ĉiu lando de Germanio estas informo pri ĝia ĉefurbo (ĉe Turingio eĉ pri du), nur ĉe Meklenburgio-Antaŭpomerio informo pri ĝia ĉefurbo mankas. Pri ondatro oni skribas "kun naĝhaŭto inter la piedfingroj", kio ne estas vero, ĉar la ondatro naĝhaŭtojn ne havas, kvankam oni tion skribas eĉ en iuj zoologiaj libroj. La naĝhaŭton anstataŭas rigidaj brovoj formantaj borderon ĉirkaŭ la plandoj kaj fingroj de la malantaŭaj piedoj. Ankaŭ "tre valora felo" tie ne konvenas, ĉar la felo de ondatro estas nur mezvalora.

Ĉar mi estas geografo, kaptis mian atenton stranga novaĵo, pri kiu mi ne

scias, ĉu ĝi meritas opinii ĝin laŭdinda aŭ rifuzinda. Oni kutimas opinii, ke **regno** estas sinonimo de imperio, sed laŭ la nova PIV estas regno "Ĉiu el la suverenaj politikaj unuoj", do tio, kion oni kutimas nomi ŝtato. Nur iuj federaciaj "regnoj" (ekz. Usono, Aŭstralio, Brazilo k. a.) laŭ la nova PIV konsistas el ŝtatoj. Aliaj "regnoj" konsistas el landoj, provincoj, regionoj, kantonoj k. s. Ni kutimas diri pri Ĉeĥio "nia lando", sed la nova PIV admonas: "Oni ne uzu la vorton lando en la senco de regno." Do laŭ la nova PIV nia lando ne estas Ĉeĥio, sed aŭ Bohemio, aŭ Moravio, aŭ Silezio. Min interesus, ĉu la federacia Ĉeĥoslovakio konsistis el du ŝtatoj (Ĉeĥio kaj Slovakio). Mi pensas, ke ne, ĉar tiam ankoraŭ ne ekzistis la nova PIV.

Lubomír Středa

Michel Duc Goninaz: la esperantisto de la jaro 2002

La revuo "La Ondo de Esperanto" ĉi-jare proponis 18 personojn, el kiuj la internacia jurio elektis Michel Duc Goninaz pro la eldono de la **Nova Plena Ilustrita Vortaro**, kies reviziadon li gvidis dum pluraj jaroj.

Iama profesoro pri slavistiko kaj esperantologio en la universitato de Aix-en-Provence (Francio), aktiva same kiel Gaston Waringhien en la SAT-medio, transprenis leksikografie lian gravegan moralan kaj sciencan heredaĵon. Literature fajna, li interalie tradukis la verkon de Albert Camus "La Fremdulo" kaj de Artur Schnitzler "Songonovelo" (eldonis KAVA-PECH).

ZEO-j

ZAMENHOF / ESPERANTO-OBJEKTOJ (laŭ interreto)

Landoj kun plej multaj objektoj (1044 objektoj en 54 landoj): Brazilo (170), Francio (163), Pollando (144), Italio (94), Hungario (91), Hispanio (81), Bulgario (74), Germanio (67), Nederlando (49), Ĉeĥio (34), Japanio (31), Aŭstrio (27), Israelo (23), Aŭstralio (16), Britio (16), Argentino (15), Belgio (13), Usono (11), Makedonio (10), Sud-Afriko (9), Kroatio (8), Litovio (7), Norvegio (7), Ĉinio (6), Finnlando (5), Svislando (5), Ukrainio (5), Danio (4), Kanado (4), Kubo (4), Ruslando (4), Svedio (4), Irlando (3), Malto (3), Jugoslavio (2), Portugalio (2), Slovakio (2), Venezuelo (2), Albanio (1), Bjelorusio (1), Egiptio (1), Estonio (1), Greklando (1), Irano (1), Kenjo (1), Kolombio (1), Korea Respubliko (1), Kostariko (1), Latvio (1), Libano (1), Madagaskaro (1), Malavio (1), Nepalo (1), Nov-Zelando (1), Rumanio (1), Tunizio (1), Turkio (1)

OBJEKTOJ EN ĈEĤIO

(laŭ interreto)

1. Bohumín [Z-Monumento 1947]
2. Bohumín [E-Aleo 1951]
3. Česká Třebová [E-Muzeo 1975]
4. Česká Třebová [E-Kafejo 1992]
5. Dvůr Králové [Z-Strato 1963]
6. Františkovy Lázně [E-Tabulo 1991 / 1995]
7. Frýdek-Místek [E-Kafejo 1970]
8. Hradec Králové [Z-Strato 1949]
9. Koprivnice [Z-Monumento 1950]
10. Lančov (ĉe Třebíč) [E-Kampadejo

1952]

11. Lančov [E-Strato 1987]
12. Lány (kastelo) [E-Arbo 1990]
13. Lázně Bělohrad [Z-Aleo 1935/59]
14. Luhačovice [E-vilao 1936]
15. Nymburk [Boleslavská str.] [Šilhart E-Tabulo 1967]
16. Olomouc [E-Vilao 1914]
17. Olomouc [Z-Strato 1932]
18. Olomouc [E-Arbo / Monumento. 1932]
19. Ostrava [Z-Monumento 1952]
20. Pardubice [Schulhof Strato 1947]
21. Pardubice [E-Epitafo (honore al Schulhof) 1991]
22. Pardubice [E-Arbo ?]
23. Poděbrady [E-Aleo ?]
24. Praha [Vršovice] [E-Arbo / Monumento 1987]
25. Příbor [E-Monumento (omaĝe al E-pioniro T. Čejka) 1964]
26. Příbor [E-Tabulo 1979]
27. Prostějov [E-Memortabulo 1999]
28. Prostějov [E-Strato 1999]
29. Slaný [E-Arbo (tilio) 1990]
30. Třebíč (E-Strato ?)
31. Třebíč (Epitafo honore al prof. Kilian) [1990]
32. Třebíč (E-Domo 1997)
33. Velké Losiny (E-Arbo 1967)

Niaj novaj aldonoj:

34. Litoměřice [Vinejo Esperanto 1938]
35. Litomyšl [tombo de K. Píč kun informo, ke li verkis Esperante, 1995]
36. Ostrava-Poruba [E-arbo (tilio) 2002]
37. Přerov [memortabulo al J. Krumpholt kaj T. Čejka 1998]

38. Skokovy [Pensiono Espero ?]

39. Stonava [E-epitafo de Karel Zipser 2000]

40. Znojmo [E-arbo antaŭ Domo de infanoj kaj junularo 2000]

Ne plu ekzistantaj monumentoj

Bohumín: Faŝistoj likvidis la malnovan monumenton el la jaro 1934.

Brno: En la strato Zábřdovická antaŭ fervoja viadukto staris domo kun ŝtona surskribo sub tegmento: "Esperanto Restoracio". Ĉirkaŭ la jaro 1990 la domo, jam longe senhoma, estis faligita.

Františkovy Lázně: La unua Esperanto-monumento en Františkovy Lázně estis inaŭgurita la 1-an de junio 1914 dum la 4-a Aŭstria Esperanto-Kongreso. Pri ĝia konstruo meritis la prezidanto de la loka Esperanto-grupo Jakob Hecht. Likvidis ĝin naziaj okupaciantoj.

Kopřivnice: En la urbo-parko staris granita bloko (inaŭgura festo 1950-09-24), aranĝita en la centro de kvinpinta stelo. Ĝi devis esti forigita, ĉar sur tiu loko oni konstruis novan urboarton.

Lichnov: Esperanta memorŝtono en Lichnov apud Frenštát pod Radhoštěm. Inaŭgurita en la jaro 1936 el iniciativo de s-ano Roman Michna. En 1941 likvidita: nazia oficiro hazarde ekvidis la monumenton kaj ordonis neniigi ĝin. Restis nuĝ stelo enmurigita sur la domo de s-ano Michna.

Praha: Antaŭ la unua mondmilito estis sur angulo de la kafejo Union granda tabulo (inter fenestroj de la unua supra etaĝo) kun surskribo "Bohema Unio Esperantista". Foto aperis en 2001 en libro de Lenka Reinerová "Kavárna nad Prahou" (Kafejo super Prago).

Praha: Ŝtonbloko el 1987 kun surskriboj Esperanta kaj ĉeĥa: "Ĉi tiu tilio estis plantita por rememoro pri la centjara datreveno de Esperanto kaj la okdek-kvina datreveno de la Esperantista klubo en Praha." La monumento ne plu staras en parko apud la tilio, ĉar en 1996 okaze de UK estis transportita al la Kongresa Centro.

OBJEKTOJ EN SLOVAKIO

Liptovský Hrádok: Monumento (surmura memortabulo kaj sube busto) al d-ro Albert ŠKARVAN (1869-1926), eldoninto de la unua lernolibro de Esperanto por slovakoj.

Poprad: En Kultura Esperanto-Centro troviĝas memortabulo kun surskribo: "Salono de Tibor Sekelj. Poprad 29.11.1986. Donaco de urbo Subotnica kaj Esperanto-societo el Subotnica." La 26an de septembro 2002 ricevis la centra parko en Poprad la nomon "Parko de Milan Zvara".

Pribylina: Hotelo ESPERANTO - la nomon proponis esperantistoj el Liptovský Mikuláš en la jaro 1969. Tie okazis refondiĝa kongreso de la Slovacia E-asocio.



Tomboŝtono de familio Zipser en Stonava

Hontema arbaristo (fino)

Sinjoro Jarouš: Li ne pensu, ke mi ion devas, ĉion mi nur povas. Nenian skandalon li faros, ĉar la sindikata organizo servas por protekti la rajtojn de laboruloj kaj por reciproka akordiĝo de entreprenaj fakoj. Tamen ne por unuflankaj avantaĝoj de individuoj. La laboristoj devas gardi en la sindikatoj siajn revoluciajn tradiciojn.

Traktoristo: Precize tiel, la entrepreno devas funkcii kaj plenumi la planon, tio estas ĝusta. Sed ni volas ankaŭ sane vivi, tio signifas respekti la higienajn normojn.

Junaj laboristoj Jirka kaj Mireček: Ni vidas, ke vi estas bonkora knabo, ni riparos la segilon, reciproka helpado necesas. Vespere venu al nia junulara klubejo, ni prezentos poemojn kaj teatraĵojn de Malgrandaj Formoj.

Oldík: Mi venos kaj eble eĉ kontribuos.

Vespere post literatura programo de junularo kaj fajrobrigadistoj la knaboj sidas komune kaj babilas pri libroj, filmoj kaj televido, ankaŭ pri teatroj kaj ĉefe pri la unua de majo venontsemajne. En siaj poemoj Oldík konfesis, ke li amas Bojenjon kaj volas starigi antaŭ ŝia fenestro ĉe studenthejmo la majan arbon.

Kiam venis la tempo, Oldík alportis la arbon surdorse, la knaboj ĝin ornamis per florkrono, elfosis kavon kaj starigis la arbon.

Bojenjo (rigardante el fenestro): Por kiu vi statigas la majan arbon, knaboj?

Knaboj: Kompreneble por vi, Bojenjo.

Bojenjo: De kiu?

Knaboj: Memkomprene de Oldík.

Bojenjo: Sed mi konas lin nur tre supraĵe.

Knaboj: Vi devas lin ekkoni pli profunde, li estas iom hontema, sed gravas, ke la arbo al vi plaĉas kaj vi plaĉas al li.

Oldík gardis la arbon dum la tuta tago, sed matene devis iri en la arbaron.

Arbarestro: Oldík, la radio anoncis, ke nekonata adoranto starigis antaŭ la knabina studenthejmo piceon, kaj ĝuste tia arbo estis al ni ŝtelita. Via tasko estas trovi la kanajlon.

Oldík: Kamarado arbarestro, mia detektivo estos rapida, estis mi tiu kanajlo.

Arbarestro: Ĉu tio helpis al vi ĉe Bojenjo? Kaj kiu helpis al vi starigi la arbon?

Oldík: Junularaj asocioj kaj fajrobrigadanoj.

Arbarestro: Mi ĝojas, ke vi jam amikiĝis kun ili kaj ke vi ne estas haroza huligano.

Oldík iris al vilaĝeto kaj kantas antaŭ la fenestro de Bojenjo.

Patrino (*krias je Bojenjo*): Kiel la Barbulo scias, kie vi loĝas? Vi scias, ke mi preparis por vi bestkuraciston. Tiajn amrilatojn mi ne toleros! Paĉjo!

Patro: Aŭdu, vi kantas kiel Gott, barbo al vi kreskas kiel al Matuška, sed se vi tuj ne malaperos, mi pelos vin kiel leporon.

Oldík revenis al la arbaro kaj konfesas al la arbaristo: Kial, ĉefo, la virinoj amas nur krudulojn, dum homo bonkora kaj afabla iĝas celo de ilia mokemo.

Arbarestro: Sciu, knabo, en la arbaro vi lertas, sed pri la knabinoj vi estas fuŝulo. Nia verda profesio scias eĉ megeron ŝanĝi je afabla cervino - sed ankaŭ min mem svatis mia edzino, alie mi estus ĝis nun maljuna fraŭlo.

M. Hlaváč

Lingvaj ludoj kaj enigmoj

(12)

Solvoj de la ĉapelumoj el la antaŭa numero:

21. paŝis - pasis (paŝas - pasas)

22. celo konvenos - ĉe lokon venos

La principo de la sekvanta enigmo estas bazita sur la ŝanĝo de unu litero en vorto aŭ vortgrupo, sekve de kio tute ŝanĝiĝas ĝia signifo.

Temas do pri tiel nomata

ŜANĜENIGMO

Certe vi trovos tiajn eblojn, ekzemple: mono - mano, sendi - senti, kolekti - korekti, nepreparita - nepre farita. La prezento de la enigmo povas esti grafike preskribita kun la difino. Alia formo estas rimajo, en kiu la divenotaj esprimoj estas kaŝitaj per aliaj vortoj kun la sama aŭ simila signifo. Oni povas preskribi la ŝanĝotajn literojn.

Vidu kelkajn montraĵojn:

k _ _ _ _ sona fadeno ĉe muzikilo

p _ _ _ _ truo en muro por eniro

Solvo: kordo - pordo

(o - u) Aŭtune. de folioj sin ŝanĝas

Kun help' de. la supon ni manĝas

Solvo: koloro - kulero

Mi volas perpoŝti senpere la aparaton,

por ke ĝi venu neriparende al adresato.

Solvo: sendi rekte - sendifekte

Jen la taskaj ŝanĝenigmoj:

23. (u - a)

Per. oni alparolas sin dum renkontiĝo

La legoma aŭ terpoma. servas al satiĝo

24. Bela ĉe aŭto la ferkaleŝaĵo

plaĉas al mi en kolora prospekto, aŭto ja estas el tre kosta vico,

sed por mi gravas pli prez' ol aspekto.

Josef Cink

PROSTĚJOV

Ekspozicio de E-gazetoj en kinejo Metro estis prokrastigita el februaro al 23.5.-23.6.2003

PLASY DUAN FOJON

La sukcesa nova aranĝo en Plasy daŭrigas ĉijare la 2-an renkontiĝon inter 19.-22.6.2003. Detalojn petu de Václav Kaprál, Plaská 252, 331 51 Kaznějov

Ni kondolencas

Kun granda malĝojo mi anoncas, ke la 21-an de decembro mortis **Alena Klementová** en la aĝo de 70 jaroj (ŝi naskiĝis la 30-an de julio 1932).

Laboro por la ideo de internacia interkompreniĝo estis la ĉefa enhavo de ŝia vivo. Rememoros pri ŝi vico da lernantoj, kiujn ŝi instruis dum kursoj de la karlovara klubo kaj en kursoj de Somera Esperanta Tendaro en Lančov. Ekde la sepdekaj jaroj ŝi aktivis kiel eminenta lektorino de la skribaj kursoj de Esperanto. Ĉi laboron ŝi modeste plenumis ĝis la lasta momento malgraŭ grava malsano.

Alena Klementová apartenis ĉiam al kolonoj de la Esperanto-klubo en Karlovy Vary. Ŝi staris ĉe lulilo de ITREE (Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro) en la jaroj 1979 ĝis '91. Do dum 13 jaroj ŝi konatigis ĉeĥajn kaj eksterlandajn esperantistojn kun belajoj de ercmontara regiono. Ŝi faris ĉiĉeroninon ankaŭ dum internaciaj kongresoj en Karlovy Vary (ekz. dum la 1-a Ĉeĥa-Germana Esperanto Kongreso en la jaro 1993 kaj dum la SAT-kongreso en la jaro 1999).

En la daŭro de jaroj ŝi preparis aron da turismaj informoj pri karlovara regiono. Ŝi kontinuigus la laboron malgraŭ severa sanstato. Ĉijare ŝi preparis la kolekton por publiki en la interreto. Hodiaŭ oni povas trovi menciitajn turismajn informojn en la interreta enciklopedio Vikipedio.

Miloš Bloudek, EK K. Vary

- La 28.12.2002 forpasis **František Arnošt** (1920) el Prostějov.

- Komence de 2003 neatendite mortis **Jarmila Wiatrová** (1953), fraŭiine Pastrňáková, el Havířov en aĝo de 49 jaroj.

La 18-an de januaro 2003 forpasis sino **Jiřina Nováková** (1936) el Náchod.

Zdena Matyková (1913-2002)

Lunde la 9-an de decembro 2002 forpasis en Brno s-anino Zdena Matyková el Hradec Králové, kiu ofte sendis siajn kontribuojn al la Pola Radío, aktivis en gvidaj funkcioj de la ĉeĥa pedagogia sekcio kaj tradukadis porinfanan literaturon el la ĉeĥa (Rabisto Rumcajs de Václav Čtvrtek, Formiko Ferda de Ondřej Sekora).

Ĉu vi ne konas la monumenton de Francisco FERRER?

Francisco FERRER (1859-1909), estis kataluna instruisto, adepto de Libera Penso kaj fondinto de Moderna Lernejo, krime ekzekutita en 1909. Konservigis esperantlingva **Pledo por Ferrer** (1909) kaj

nekvalita bildkarto kun monumento (kvar kolonoj sub baldakeno, busto simila al Zamenhof, kaj sur la piedestalo ĉeĥlingva surskribo: **Francisco Ferrer, průkopník volné školy**). Ĉu iu el vi ne scias, en kiu urbo ĝi estis? Vidu pli belan reproduktion ĉe:

<http://clavis.cz/starto/ferer.jpg>

KALENDARO 2003

- 14.-16.2. Paroliga kurso Brno
 11.-13.4. Adonido Ratfškovice
 24.4. Ekspozicio Svět knihy Praha
 25.4. Ekspozicio K. Čapek en tradukoj (Strž)
 12.-18.5 Skokovy
 7.6. 70. let Svitavy
 23.5.-23.6 Ekspozicio de esp. gazetoj (Kinejo Metro en Prostějov)
 19.-22.6. La 2-a renkontiĝo en Plasy
 19.-23.6. IKUE-renkontiĝo en Koclfřov
 29.6.-9.8 SET Lančov
 12.-18.7. EKOTUR Bohemia Karsto (Karlštejn)
 19.-25.7. OSIEK-konferenco
 19.-26.7. IKUE-tendaro Sebranice
 26.7.-5.8. Flugkaravano al UK Gotenburgo (Svedio) kaj Kopenhago (Danio)
 30.8.-6.9. Ekumena Kongreso Rimini (buse)
 20.9. Esperanto-tago Pardubice
 26.-28.9. 16-a IKF Ústí nad Labem
 3.-6.10. Komuna konferenco de GEA kaj ĈEA
 25.10.-12.11. Ekoturisma flugkaravano al Koreio, Japanio kaj Taivano
 21.-28.11. Internacia kurso de Esperanto en Dobřichovice
 28.-30.11. Paroliga kurso en Dobřichovice
 6.12. La 23-a Ĉeĥa-Saksa TAGO Ústí n.L.

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Komerční banky vyplníte pokladní složenku pečlivě ve všech kolonkách, tedy: *měna účtu*: Kč, *č. účtu*: 3330-021/0100, *měna hotovosti*: Kč, *částka*: slovy kolik platíte, *jméno a příjmení*, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenný seznam. Pokud posíláte peníze za sebe, **zopakujte v této kolonce své jméno**. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stále

(viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379.

Seznam čísel:

- 06940 ČES
 06941 UEA
 06942 předplatné Starta bez členství
 06943 dary ČES
 50200 sekce železničářů
 50400 komise pedagogická
 50401 písemný kurs začátečníci
 50402 písemný kurs pokročilí
 50403 členství ILEI
 50404 Paroliga kurso
 50405 svazové zkoušky
 50500 sekce přátel SAT
 50600 sekce šachistů EŠLI
 50800 sekce nevidomých LIBE
 50900 sekce zdravotníků UMEA
 51000 sekce křesť. esp. KELI
 51100 sekce katol. esp. IKUE
 70100 komise pro tisk a inf.
 80200 ediční fond
 80300 propagace v tisku
 80400 fond Tilio

Pro jistotu napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

Neurčené platby:

členství v ČES: 16.12.02 - 150,- Kč

20.12.02 - 150,- Kč

členství v UEA: 17.12.02 - 1.100,- Kč

(ozvěte se tajemníkovi svazu)

Jak poslat peníze do zahraničí?

Pokud chcete zaplatit knihu, předplatné časopisu, účastnický poplatek apod. do zahraničí, pošlete peníze **mezinárodní složenkou MP1**, kterou si vyžádáte na poště.

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

KS de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj dezirantoj. Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042 Japanio.

Internacia printempa festo

okazonta 26-27.4.2003 en Coswig, urboparto Sörnnewitz, hotelo Bosel-blick, kotizo 48 eŭroj, kultura kaj turisma programoj. Norbert Karbe, dr.-Otto-Nuschke-Str. 12, DE-01796 Pirna

88-a UK de Esperanto

okazas ĉijare en la sveda Gotenburgo (26.7.-2.8.2003) kun la temo *Lingvaj rajtoj kaj respondecoj*.

Pasporta Servo 2003 haveblas

La nova adreslibro survojas al la Libroservo de UEA kaj al la gastigantoj. Gastigantoj ricevas ĝin senpage, sed bonvolu atenti, ke kelkfoje ĝi bezonas plurajn semajnojn por atingi vin. Ni tutkore dankas al la multaj gastigantoj, kiuj rezignis pri sia senpaga ekzemplero, ĉar tio nun ŝparas al Pasporta Servo centojn da eŭroj.

La gastoj devas la libron aĉeti kaj per tio ili akiras la rajton uzi la sistemon. Sed necesas sian viziton antaŭe interkonsenti kun la gastiganto, ne lin surprizi neatendite!

Pasportan Servon prizorgas TEJO.

Starto 2002 - Supervido

Starto 1/2002 (202): Rekte, kuraĝe (Corsetti), Eli Urbanová jubileas, Josef Kavka 80-jara. Homonimioj 13, Nova muŝo el tropikaj landoj (Fischer), Muzeum Pictus, Česká Třebová, Invito al nova renkontiĝo (Plasy), Skokovy, La 1-a SET kaj kio okazis antaŭ ĝi, Rememoroj de skolto, 50-a SET Lančov 2002, Pri TEJO-kongreso 2001, La unua Esperanto-simfonio jam havebla kompaktdiske!, Demokratio kiel aktiviga forto, La kvara internacia fotokonkurso, "Oraj kantoj" aperis, Serĉatas nova TEJO-volontulo en la Centra Oficejo, Post Fortalezo kaj Gotenburgo UK iros al Pekino kaj Vilniuso, Komunikada centro en Bruselo, Post 20 jaroj da AIS-laboro: alvoko al la esperantistaro universitatnivele kunagi, Esperanto en Ĉinio, Kompaktdiske Duone, Interesa faka aplikado. Stomatologio, Infandeseĝnaĵoj, Novjara donaco por Esperantio, Zaben-e-salam, Rozpočet, Novuloj en la CO UEA, Heroldo sen ĉefredaktoro, Ing. Milan Zvara forpasis, Programistoj respondas, KAEST 2002, Bokarev-vortaro akiris komputilan formon, Lingvaj ludoj kaj enigmoj 9, La mondo sen militoj laŭ Einstein, Kafego super Prago, Umberto Eco: Hledání dokonalého jazyka v evropské kultuře, Forpasis aŭtorino por infanoj, nabídka Libroservo, Ni kondolencas (Maŝita, Lokšan, Vojtek, Vaverková, Hillebrand, Fiala, Vanc), Mortis kamarado IVO. Informoj el sekretariejo (nejasné platby, návrhy do svazového výboru), Kalendaro 2002, Jak platit svazu

Starto 2/2002 (203): Milenia arbo, Esperanto-arbo Olomouc, 50 jaroj de SET Lančov, Solena vicigo, Nia filmo pri Milenia arbo, Nia filmo pri Lančov, Kion nia asocio povas fari en la plej proksima

jardeko?, 55-a IKUE-kongreso Kroměříž, Renkonto de la katolika sekcio en Želiv. La 11-a Refreŝiga E-tendaro Nekvasovy, Homonimoj 14 (Kavka). KAEST 2002, Atenton - ŝanĝo!, Historio de la lastaj militaj tagoj 1945, Avantaĝo de Esperanto, Esperanta Enciklopedio, 410-a naskiĝdatreveno de Instruisto de Nacioj, Johano Amoso KOMENIO, Promeso de J. Chirac, Europeana (Ouředník), Humphrey Tonkin inter ĉeĥaj esperantistoj, Esperanto ĉe altlernejo, Monopolo de sciado, Internacia ekspozicio de infandeseĝnajoj, Informace výboru ČES, Renkontiĝo en Šumperk, Helpu al Kronach-esperantistoj, Junuloj por Dresdeno, Intervjuo en la slovakaj televido!, Papo benis en Esperanto, Nova esperantista societo en Brno, Kiom da E-libroj jare?, Skokovy 2002, Adonido 2002, 100-jara datreveno de la unua landa E-asocio en Hungario, 15-a IKF Ústí, Lingvaj ludoj kaj enigmoj 10, Ni kondolencas (Košínková, Pecák, Müllerová), Foriris Thor Heyerdahl, Kiu veturos al Verona?, Kiu helpos al Brazilano?, Kalendaro 2002, Jak platit svazu **Starto 3/2002 (204)**: 55-a kongreso de IKUE, Diverseco - ŝanco, ne minaco, Kongresaj impresoj, El la malferma parolado, Kongresa Temo, Kongresa rezolucio, Koncize el UK Fortalezo, La nova PIV, Opinioj pri la nova PIV, Knabinoj el Česká Třebová en Skotlando kaj Anglio, Renkontiĝo en Svitavy, Esperantistoj sur Ĉantorija-monto, Turista renkontiĝo en Plasy - Nova aranĝo sukcesis, Ekoturisma renkontiĝo en Kvilda, 15-a IKF, Ideoj de Václav Vanc, Lančov 50-jara, Pozvánka a Přihláška na 10. sjezd ČES, Inundoj en Ĉeĥio, Libroŝerjo, Novaj stampajoj, Insignoj EK Vítkovice, Kluba vivo, IKUE-kongreso en ĉeĥa gazetaro, Ni petas pardonon, Estu pli pacienca, mi petas (Staňura), 100 jaroj de KE Praha kaj ĈEA,

Ne forgesu KAEST 2002, 3-a Eŭropa Medicina Esperanto-kongreso, Nova E-dokumento aperis, Al lingva demokratio! Alvoko al la esperantistaro, Vojaĝo en Esperanto-lando, Membraro de UEA en 2001, Vikipedio, Atentinda poemaro, La Baptofilino, Werner: Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj, Hlaváč: Hontema arbaristo, Lingvaj ludoj kaj enigmoj 11, Amo-finaĵa mamamado, Kondolencoj (Vogelmann, Aleksiev, Jaromír Žák, Jaroslav Žák), Kalendaro 2002, Jak platit svazu, Neznáte adresu?, Gratulo.

Starto 4/2002 (205): 10-a kongreso de ĈEA (100-jariĝo de la Praga klubo, La kongresa traktado, La kongresaj diskutoj), Novaj honoraj membroj (Hršel, Pastrňák, Patera, Pištora, Podhradská, Smyčka). Podhradská: ĈEA 1999-2002, Rezolucio, Český esperantský svaz - Stanovy, Ĉeĥa-Saksa Tago, KAEST 2002: Elektronikaj rimedoj, Sciigo pri RET Nekvasovy, Půjčovní řád Odborné knihovny ČES, Sorpeto kantis en Bretonio, Internacia kultura festivalo 2002 en Ústí nad Labem, Tomáš Pumpr (1906-1972), (Restu membro de la Esperantokomunumo, Nia filmo, Masaryk-Akademio de Artoj, Pardubice, Vítkovice, Ni kondolencas (E. Wohlge-muth, C. Vrbík, J. Bubeníková, A. Vlach, J. Dufková, O. Ungerová). Ni gratulas, Korespondi deziras, Mladá Boleslav, Ostrava-Poruba, Biblia Studkurso, OSIEK-premio 2002.

**TOTO ČÍSLO JE
POSLEDNÍ, které
dostáváte, pokud jste
nezaplatili členský
příspěvek na rok 2003 !!!**

Periodikum Ĉeského esperantského svazu (34. ročník)

Redaktor: Miroslav Malovec,
 Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
 malovec.starto@clavis.cz;
 www.clavis.cz/starto

Ĉlenská evidence a změny adres:
 Pavel Polnický, ĈES

Uzávěrka dalšího čísla: 30.4.2003

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (34-a jarkolekto)

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 9 eŭroj (se aerpöšte: + 2 eŭroj)

Redaktor: Miroslav Malovec,
 Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
 Ĉeĥio, e-mail:

malovec.starto@clavis.cz;
 www.clavis.cz/starto

Presis: OPATISK Opava

Redaktadfermo de la sekva numero :
 30.4.2003

ISSN 1212-009X

IKUE-aranĝoj. Aliĝojn akceptas s-ano Miloslav Šváček, Tršická 6, 751 27 Penčice:

19.-23.2003 Renkontiĝo en Koclřřov apud Svitavy

19.-26.7.2003 Tendaro Sebranice

30.8.-6.9.2003 Bus-ekskurso al la 14-a Ekumena Kongreso en la itala Rimini

Ekspozicio pri la tradukoj el Karel Ĉapek estos inaŭgurita en "Pamätník Karla Ĉapka" (Muzeo Karel Ĉapek, Stará Hut' en Strž apud Dobřřřš) la **25-an de aprilo** 2003 je la 14-a horo. Inter la diverslingvaj tradukoj aperos ankaŭ la esperantlingvaj (prizorgis Ing. Margit Turková, parolos M. Malovec, K. Kraft).

Informaĉni adresarŝ esperantskŝych a esperanto pouŝivajicich subjektŝ ŝ České a Slovenské republiky estas produkto de samideanoj el Plzeň (Jiřřř Vomáĉka, Koterovská 30, 326 00 Plzeň).

Filmo pri Profesoro Reinhard Selten.

Pli malfrue ol esperite aperis 55-minuta videofilmo, en kiu Rainer Kurz intervjuas la Nobel-premiiton pri Ekonomio 1994. Je demando pri la estonteco de Esperanto la 73-jara profesoro akcentas ĝian propedeŝtikan valoron por la lingva orientigo kaj deklaras, ke kvankam nenio estas certa, li forte esperas, ke Esperanto ricevos la merititan rekonon.

F259

MALOVEC MIROSLAV
 BOSONOŝSKÁ 15
 625 00 BRNO